


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2004



*Petri (maldekstre), Börje kaj Matti kaj esperartecaj herbaj erinacoj.
Legu pli pri esperarto sur paĝoj 5-8.*

Al kvalita komunikado: kiel partopreni, p. 20

Raporto pri Valamo-kursoj, p. 8 ♦ Aŭtunaj Tagoj, p. 16

Pietiläinen elektita al komitato de UEA, p. 14

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@tiscali.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmögatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteer: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

tgrundstrom@

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ www.lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@helsinki.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Auli Vihermä, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timospi@suomi24.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Esperanto – ĉu tamen politika temo dum la EU-elektoj?

Ĉiuj esperantoparolantoj ne interesiĝas pri politika antaŭenigo de esperanto, kaj tiuj kiuj interesiĝas ne nepre kredas je sukceso. Tamen politikaj celoj estas esenca eco de la esperantomovado: lingvopolitikaj, edukpolitikaj, kulturpolitikaj. Tio estas evidenta afero. Eĉ eksteruloj, aŭdante la vorton movado, tuj tion komprenas, sed ĉu niaj politikaj temoj interesas la ĝeneralan publikon? Ĉu ekzistas rekono pri la rolo de la esperantomovado kiel politika aganto?

La enketo al la EU-kandidatoj, kiun ni publikigis en la pasinta numero de Esperanta Finnlando, povas esti uzita kiel testo de tiuj demandoj. Klaras ke ĝi montris ekziston de intereso inter la kandidatoj al “niaj temoj”, al la lingva situacio de Eŭropa Unio. Granda parto de la kandidatoj reagis. Tio ankaŭ montras ian rekonon pri nia ekzisto. Ni povas pensi ke ili preferus ne respondi se ili taksus ke EAF estas io tre suspektinda, eble eĉ nur ŝajnasocio, kiu povos misuzi iliajn nomojn por fiaj propagandaj celoj.

Ni povas kontenti pri la reeĥo de la kandidatoj, sed ankaŭ la neekzistinta gazetara reeĥo pri la enketo indikas ion pri nia perceptata politika rolo: Ni sendis gazetarajn komunikojn pri ĝi al pli ol 50 retadreso, sed – laŭ nia scio – neniu gazeto, radio aŭ televida programo menciis ĝin. La afero klarigeblas kompreneble, ekzemple per tio ke abundis pli interesaj aspektoj de la EU-elektoj – ekzemple diskuto pri tio ĉu parlamentano de Finnlando nepre subtenu finnon kiel prezidanto de la Eŭropa komisiono ... sed la fakto restas: La esperantomovado ne videblas sur la politikaj paĝoj, ne movas politikajn redaktojn.

Malpli politikaj temoj tamen interesas. Komence de julio, kiam ni sendis gazetarajn komunikojn al la Finna Noticburoo pri la elekto de Jukka Pietiläinen kiel B-komitato, tio efikis. La buroo dissendis noticon kiu multloke aperis. Ankaŭ esperantokulturaj fenomenoj lastatempe interesis multajn. La plej brila ekzemplo de tio estas la apero de Dolchamar sur amaso da kulturaj paĝoj, eĉ en kultura radio.

Ni superis la kulturen novajsojn. Ĉu indas ambicii la superon ankaŭ de la politika? Ekzemploj de aliaj landoj signas malfermiĝon.

En Pollando Margareta (Malgorzata) Handzlik elektiĝis kiel unu de la 54 polaj EU-parlamentanoj. Malfacilas taksu kiom helpis ŝian rezulton ŝia malferma esperantisteco, sed evidente ĝi ankaŭ ne malhelpis. (Ĉe <http://www.malgorzatahandzlik.com> estas ligo ‘esperanto’.)

En Francujo listo ‘Eŭropo – Demokratio – Esperanto’ ricevis pli ol 25 000 voĉojn, 0,15 procentojn de la voĉoj. Jes vere, tia grupiĝo prezentis kandidatojn, malgraŭ protestoj de la oficiala esperantomovado ... Mia unua sento pri E-D-E estis ke ho, frenezuloj, sed eble jam la dua: se tiaj kuraĝuloj ekzistas, kuraĝon kaj sukceson al la kampanjo. La partopreno en la elektoj donis amaskomunikilan atenton. Onidire multiĝis la aliĝoj al francaj retkursoj de esperanto. Eĉ personan sperton de tio mi havas: renkontinte ĉi-somere amase da ne-esperantistoj en familia renkontiĝo en Francujo mi aŭdis kelkajn pozitivajn komentojn pri la E-D-E-listo. Ŝajne ĝi estis rimarkita.

Anna Ritamäki

Ambicioj por gazetfarado

Iĝinte ĉefredaktoro, mi havas (kaj mi pensas ke devas havi) kreskintan intereson legi aliajn asociajn gazetojn, kaj novajn kaj malnovajn numerojn, por kompari kun la propra. En IJK mi prenis tri ekzemplerojn de Rusia Esperanto-Gazeto, REGo. La najbarlanda gazeto estas tuj per unua rigardo bona komparo kun la nia: Same kiel Esperanta Finnlando, REGo aperas en jaro sesfoje kaj estas farita en la sama grandeco A5 kaj presata nigrablance, krom ke kovrilpaĝaj rubrikoj de REGo havas ruĝajn kaj verdajn spicumojn.

REGo

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

Paĝojn la rusoj en sia gazeto havas iom pli ol ni, sed feliĉe ne rekte proporcie kun la loĝantaro de la lando, ĉar 900-paĝan gazeton certe tralegus neniu; La ĉiuj tri numeroj de REGo havas pli ol 50 paĝojn, kaj tiuj ŝajnas iom pli dense per teksto plenigitaj ol kio kutimas en EF. Bildoj en REGo estas ne vere malmultaj, sed kutime malgrandaj. Tio donas al REGo eble iom pezan kaj malfacilan aspekton, sed la enhavo tamen estas ankaŭ interesa, memorante ankaŭ humuraĵojn.

La plej elstara diferenco de nia gazeto estas, ke REGo estas preskaŭ nur en Esperanto. En la tri numeroj estas nur unu artikolo en la rusa lingvo, kaj ankaŭ tio estas represaĵo de artikolo publikigita en ruslingva gazeto, por esti ekzemplo de ekstermovada informado. Speciale mirigas, ke mankas eĉ la minimumaj organizaj kontaktinformoj en la rusa, sed eble la rusoj havas aliajn kanalojn por ekstera informado kaj konscie dediĉas REGon por nur enmovada informado.

Antaŭ jaroj, kiam unuan fojon mi konatiĝis

kun Esperanta Finnlando, min iom ĝenis tio, ke oni tiom skribas en la finna lingvo en Esperanta gazeto. Tiam, estinte individuisma kaj memstara esperantisto, mi tendencis pensi, ke se oni faras gazeton en Esperanto, tiam oni havu ankaŭ ambicion skribi ĉion en Esperanto.

Nun, post ke mi akceptis organizajn taskojn en la Esperanta movado, mi pli bone konscias, ke gazeto kiel EF ne konstruu altan sojlon inter Esperanto-movado kaj cetera mondo. Eĉ male, la gazeto devas esti kvazaŭ montra fenestro kaj enirejo, kiu prezentas la enhavon de la movado kaj ofertas facilan eniron por interesiĝantoj. Ne ĉiuj komencantaj esperantistoj estas kiel mi, ke ili post la decido lerni Esperanton farus tion sendepende de tio, kion organizoj kiel EAF prezentas de si.

Unu ambicio de la gazeto estu oferti legeblan enhavon al ankaŭ tiu preterpasanto, kiu en biblioteko hazarde komencas foliumi ĝin por sciigi, kio estas Esperanto kaj kio fareblas per Esperanto. Por tio devus plejeble bone funkcii, ke la gazeto havas finnlingvan ĉeftitolon kaj ĉiam kelkajn finnlingvajn artikolojn. En tre bone realigita stato povus eĉ rezulti, ke Esperanta Finnlando estus vaste konata opinigazeto pri lingvo, internacieco kaj kultura bunteco, kie prezentitaj opinioj estus frekvente citataj en Muut lehdet-artikoloj de cetera finna gazetaro.

Ĉu tro nerealisme ambiciaj pensoj? Povas esti, memorante ke la membronombro de EAF lastjare falis jam sub 400. Sed ĉi-momente ni daŭre almenaŭ strebu realigi cirkonstancojn, kiuj ebligas influon de novaj membroj kaj turni la membronombro al kresko. Tien kontribuos ekvilibro inter diverslingvaj artikoloj, sed ankaŭ ekvilibro inter movadaj kaj ekstermovadaj temoj kaj ekvilibro inter seriozeco kaj distreco.

Mikko Mäkitalo

Kie Sibelius kaj Beethoven blekas

Loko, ideo kaj aktivado

En sudfinlanda komunumo de Orimattila, for de la ĉefaj trafikvojoj, apud malgranda vojo troviĝas ŝildo, kiu aludas pri Esperanto. Legeblas teksto "Pro Esperanto ry.", kaj malantaŭ eta peco de arbaro troveblas domoj, bieno Ali-Sep-pälä. Tie loĝas Börje Eriksson kun sia familio, edzino kaj 17-jara handicapulo Kai.

Jam la korto montras, ke ne temas pri plej averaĝaj homoj, kiuj loĝas tie. Vizitanton salutas multaj diversaj artaĵoj, kiuj eble jam pro unua rigardo vekas admiron, sed kies plenajn signifojn iom post iom Börje rivelas per siaj rakontadoj por vizitanto, kiu havas la sufiĉan trankvil-emon por pli konatiĝi kun lia idearo.

Ĉu do la lignaj artaĵoj estas la Esperanto, kiun la nomŝildo apud la vojo aludas? Ni lasu, ke Börje per intervjuo iom klarigas, kion li celas – ĉu Esperanto estas io konkreta, kiel artaĵoj sur korto, aŭ io pli abstrakta ideo...?

Börje: "Estas ambaŭ konkreta kaj abstrakta. Ĉefe spirita proceso, ke strebu al fari ion en nova maniero. Iom pli ol nur la lingvo. Mi kunligas la lingvon kun socia arto. En tiu koncepto estas socia, spirita kaj ekologia ideoj. Sur la korto estas parto de Esperanto. La ideo estas recirkulado. La artaĵoj estas ekzemplo de recirkulado de la tuta vivo."

La bienon posedas fonduso Sylvia-koti Sää-tiö. Ĝi estas antropozofia hejmo kaj laborloko por mense handicapitaj homoj en Lahti. Ili ricevis la lokon per testamenta donaco kaj Börje transloĝiĝis tien jare 1996.

EF: Kio estas la centra ideo de la Esperantobieno?

Börje: "Kiam mi aŭdis pri la loko, Sylvia-koti ne havis ideojn, sed mi sciis, ke eblus fari ion. Estis por mi la ĝusta tempo veni ĉi tien kaj provi fari ion. Ĉu mi sukcesis, estas alia afero, sed

mi kredas ke mi sukcesis."

Sed vivo estas ne ĉiam simpla kaj lastjare Börje havis dilemon pri la daŭrigo. *Kio tiam okazis kaj kiel aferoj solviĝis?*

Börje: "Dum du jaroj ni kunlaboris kun rajdstalo Aventuro, kiu funkciis en konstruaĵoj de la sama bieno. Ĝi volis aĉeti la tutan bienon kaj preskaŭ sukcesis. Finfine Sylvia-koti ne vendis ĝin kaj Aventuro aĉetis alian lokon."

EF: Kiajn aktivadojn vi havas ĉi tie?

Börje: "Preskaŭ ĉiujare estis iu koncerto. La unua estis afrika gospel-koncerto. Poste interalie hispana gitarduopo Rafols-Rodriguez – ili estas esperantistoj – kaj estis estona kaj finna koruso kune, kaj estis Aleksas Masjukas kun harmoniko, Asorti el Litovio, kaj ankaŭ loka koruso. Iam okazas ĉi tie semajnfinoj kun pentrado. Kun la Esperanto-klubo de Lahti okazas renkontiĝoj. Estis ankaŭ Esperanto-kursoj en lernejo kelkaj kilometroj de tie ĉi."

EF: Ĉu estas multaj aliaj homoj ol vi mem, kiuj kontribuas al aktivadoj de la Esperantobieno?

Börje: "Al asocio Pro Esperanto ry. apartenas dek homoj, sed plejparte ili konkrete ne multon faras. Henry Heinonen 2-3 foje en jaro venas al kunvenoj kaj helpas. Preskaŭ ĉiusomere ni havas eksterlandajn volontulojn, por tuta somero aŭ malpli longe. Ankaŭ la handicapitaj gastoj, kiuj vizitas, ofte helpas."

Inter la volontuloj estas kaj esperantistoj kaj aliaj.

Börje: "De la eksterlandanoj ĝis nun kvar estis esperantistoj kaj du iĝis ĉi tie esperantistoj, aŭ almenaŭ interesiĝis."

EF: Ĉu vi komence havis ion tian grandan ideon, kiu ne realiĝis? Ĉu venis iuj neatenditaj aferoj?

Börje: "Mi havis vizion iomete tro idealisman.

Mi estis relative nova esperantisto tiam kaj pensis, ke eblas fari pli ol kio fakte eblas. Mi pensis, ke pli multaj homoj trovus ĉi tien. Estus pli da volontuloj. Mi ĉiam esperis pli bonan, sed estis ankaŭ realisma. Ankaŭ ekonomie, la mono ĉiam sufiĉis, sed povus esti pli profitanta.”

Multlingvismo

En hejmo de Börje aŭdeblas mikso de lingvoj. Ne nur pro Esperanto, ne nur pro eksterlandaj volontuloj: duope kun sia edzino Börje parolas la germanan, kaj origine li estas svedlingvano. *Kiel vi svedlingvano nun sentas vian estadon en Orimattila?*

Börje: “Duonon de mia vivo mi nun jam vivis en Lahti-Orimattila -regiono. Kvankam mi ne uzas la svedan ofte, ĝi restas mia unua lingvo. Foje mi eĉ jam parolas malbone la svedan.”

EF: Kion vi faris en via vivo antaŭ la Esperanto-bieno?

Börje: “Mi estas merkonomo ĝis 1968. Jare 1968 okazis ŝanĝo en mia vivo, mi aliĝis al Emmaus-movado. 1972 mi eniris lernejon pri ĝardenistoj. Mi estis ĝardenisto en Tapola, hejmolaborejo por handikapuloj, kaj kelkajn jarojn ankaŭ en Sylvia-koti.”

EF: Kiam vi lernis Esperanton?

Börje: “Ĉu estis 1991 aŭ 1992... Verŝajne -92. Antaŭe mi sciis pri ĝi. Mia patro havis libron de Vilho Setälä. Mi profunde pripensis kaj kiam estis preskaŭ 50-jara, decidis lerni. Memstare ĉefe, 1994 partoprenis ankaŭ kurson en Jyväskylä.”

EF: Vi ŝajnas havi en pli-malpli ĉiutaga uzo tri-kvar lingvojn. Ĉu estas komplike tiel?

Börje: “Ni parolas plejparte la finnan hejme, ankaŭ la germanan, kaj ankaŭ la anglan kun eksterlandaj volontuloj. Mi ŝatas uzi diversajn lingvojn kaj ne sentas ĝin tro komplike. Mi ŝatus uzi Esperanton pli ofte.”

EF: Oni nun planas, ke la deviga sveda en lernejo estus tiel ŝanĝota, ke ĝi ne plu estus deviga en studenta ekzameno. Kion vi pensas pri deviga lingvoinstruado en lernejo?

Börje: “Tiom longe kiom Finnlando havas du naciajn lingvojn, estas bone, ke tiom multaj kiom eblas scipovus ambaŭ. Kiam mi scias, ke Esperanto ekzistas, mi pensas, ke oni ne devus devigi ĉiujn lerni la alian nacilingvon. Pri tiu ebleco pli da homoj devus scii.”

EF: Ĉu Esperanto povus ekzisti sen Esperanto?

Börje: “Eble. Iomete eble en la sama direkto. Sed Esperanto multe signifas. Sen ĝi mi ne povus vidi la eblecon kombini aferojn. Ke estas diverseco en unueco. Esperanto montras, ke tio eblas.”

EF: Ĉu Esperanto povus ekzisti sen Kai?

Börje: “Eble ne. Certe ne.”

Flanke sidanta Kai: “Ne, ne, ne!”

EF: Ĉu Esperanto povus ekzisti sen arto?

Börje: “Ne. Arto estas tre grava afero. Ligilo



Börje kaj Beethoven. La pli juna de la du grizbarbuloj ricevis nomon laŭ muzikplaĉoj de Kai.

inter spirito kaj materio. Aŭ inter scienco kaj religio.”

EF: Ĉu Esperanto povus ekzisti sen antropozofio?

Börje: “Jes. Ekzistas.”

Kai, sperta esperantisto

Certe ni devas ankaŭ intervjui la en rulseĝo sidantan Kai, sen kiu Esperanto ne povus ekzisti. Reale ne povus, ĉar vartado de Kai estas la ĉefa enspezo de la familio.

EF: Ĉu vi ŝatas loĝi en tiu ĉi domo?

Kai: “Jes. Estas trankvile loĝi ĉi tie.”

EF: Kiumaniere vi lernis Esperanton?

Kai: “Ni havis ekstrelandajn gastojn ĉi tie. Kaj el libroj ankaŭ.”

EF: Ĉu vi parolas aliajn lingvojn ol Esperanton kaj la finnan?

Kai konfesas rifuzemon pri la denaska lingvo de sia patro: “En lernejo mi havas la anglan kaj la svedan. Mi ne ŝatas studi la svedan, sed la anglan.”

EF: Kiom ofte vi uzas Esperanton, kaj en kiaj okazoj?

Kai konstatas, ke ne estas devige respondi ĉiam en Esperanto: “Silloin kun on pakko.”

EF: Kion vi ŝatas ĝenerale fari ĉi tie?

Kai: “Rigardi televidilon. Kaj aŭskulti muzikon. Mi vizitas koncertojn iom ofte. Sibelius estas mia favorata komponisto.”

EF: Ĉu vi havas eksterlandajn amikojn?

Kai: “El Ĉeĥio, Slovakio kaj Anglio. Konektas kun ili per retoŝto.”

EF: Ĉu vi volas diri specialajn salutojn al legantoj de Esperanta Finnlando?

Kai: “Hobiu Esperanton, ĝi estas amuza lingvo. Konservu vian parolpovon tiom longe kiom eblas kaj kiom longe vi vivas.”

Novaj studentaj esperantistoj

Dum la printempa semajnfino samtempe kun mi la Esperanto-bienon vizitas ankaŭ du junaj, novaj kaj daŭre lernantaj esperantistoj, Matti kaj Petri. La 26-jara Petri Tuovinen, post duonjara studado, jam kuraĝis kaj sukcesis fari la inter-



Kai en sia rulseĝo salutas legantojn de EF.

vjuon en bona Esperanto. Li lernis kaj memstude kaj en grupo, kie oni samtempe studas Esperanton, la finnan kaj la rusan, per partoprenantoj finnaj, rusaj kaj litovaj en Lahti.

EF: Ĉu ŝajnas por vi, ke Esperanto povus esti signifanta faktoro en estonta mondo?

Petri: “Laŭ mia opinio Esperanto povus esti lingvo, kiu kunigas homojn tutmonde.”

EF: Ĉu Esperanto ĝis nun ofertis ion specialan al vi?

Petri: “Por mi ĝi estas interesa kaj lernebla lingvo. Unua lingvo, kiu sentiĝas propra”.

Li konatiĝis kun Börje tra la Esperanto-klubo de Lahti, kaj vizitas nun duan fojon la Esperanto- ▷

▷ domon. Specialajn opiniojn pri Esperarto-koncepto li per demando ne donis:

Petri: “Mi konatiĝis kun la artaĵoj sur la korto...”

EF: Ĉu vi legas Esperanta Finnlandon? Kian impreson ĝi donis al vi?

Petri: “Jes. Tre bonan impreson. Troviĝas informoj pri kursoj. Interesaj rakontoj pri diversaj personoj.”

Do jen povis ankaŭ Petri partopreni rakonton pri tre interesaj personoj. Tiaj estas krom la homaj personoj ankaŭ Sibelius kaj Beethoven, kiuj blekas en la bestejo.

La bieno tre vizitinda ofertas por vizitantaj gastoj lueblan dometon, kaj volontulajn laborojn por aktivemuloj. La gastojn bonvenigas ne nur la trankvila ĉirkaŭanta naturo, sed ankaŭ la etoso de la ĉiam bonvolema Börje.

Mikko Mäkitalo

Konciza konstato pri antropozofio

Kun Börje ripete aperadas la koncepto de antropozofio. Ĝi kaj ĝia fondinto Rudolf Steiner estas verŝajne por multaj homoj konataj surface, kaj ne pli ol tre surface. Steiner (1861-1925) estis filozofa kaj pedagogo, kiu vivis en la germanlingvaj landoj kaj verkis amason da libroj. Kelkaj antropozofiaj libroj de Rudolf Steiner estas ankaŭ esperantigitaj (de Willy Nüesch) kaj estas aĉeteblaj i.a. ĉe libroservo de UEA. Steiner ankaŭ fondis novmetodan lernejon, kies tipo disvastiĝis al diversaj landoj, kaj kontribuis al klinika kaj terapia instituto. La esenco de antropozofio estas disputata, sed almenaŭ ĝi evidentiĝis esti daŭrebla, vivforta mondrigardo. Estas dirata, ke profunda diferenco disigas antropozofion de tradicia okultismo, kaj laŭ ĝi scienca metodo estas akordigebla kun supersensa mondrigardo.

(mm)

Valamo 2004

La kvina sinsekva esperanta kursosemajno okazis de lundo ĝis vendrede 5.-9.7.2004 en la Popola Instituto de Valamo en la belega kaj trankvila etoso de la monaĥejo en Heinävesi. La kurson partoprenis entute 18 gelernantoj, kiuj dividiĝis en elementa kaj daŭriga kursoj de spertaj instruistoj Atilio Orellana Rojas kaj Raita Pyhälä (Saliko). Kursorespondeculo Tiina Oitinen partoprenis la daŭrigan kurson. La ĵaudan festan vesperon partoprenis krome unu gasto.

En la elementa kurso de Saliko ĉeestis 6 gelernantoj: 4 finnaj komencantinoj (inter ili unu 8-jarulino), 1 komencanto el Meksiko kaj 1 finna progresantino. La kursanoj diligente kaj sukcese laboris kaj lernis dum la semajno preskaŭ same multe kiel dum unu semestro de normala kurso.

En la daŭriga, ĉi-jare sugestopedia kurso de Atilio Orellana Rojas ĉeestis 12 kursanoj. Ili partoprenis Esperanto-Simpozion, kiu temis plejparte pri ĉevaloj, sed ankaŭ dediĉis sin en la serĉado de la malaperita ikono de Sankta Georgo. Inter multaj amuzaj momentoj aperis lingvaj aferoj, de kiuj espereble kelkaj restis en la kapoj de la kursanoj. La partoprenantoj de la simpozio venis el la tuta mondo, inter ili aperis ekzemple monaĥo Zeharja Ĥristoforis, ĵurnalisto Ĵeromo Le Trotteur, tajlorino Ĝizela Ĝillet kaj Hipoterapiisto Paŭla Tilio. El Finnlando la simpozion partoprenis ikonfaristo Marko Jalustila. Legu la mallongajn raportojn pri simpozio, skribitaj de la simpozianoj mem. Krome Ĵeromo kaj Ĥimena raportas aparte.

Krom la lecionoj estis kiel jam tradicie kuna libertempa programo por la tuta grupo. La semajno komenciĝis kun prezentado de la monaĥejo, la rondiradon gvidis loka monaĥeja ĉiĉerono. Marde eblis krozadi en la apuda lago Juojärvi aŭ memstare viziti la monaĥinejon de Lin-



Atilio en barata/hindia vesto donacis librojn.

tula. Merkrede en la programo estis vizito al la monaĥeja tombejo kaj ĵaude la kursanoj vagadis al la kruco de la migranto, kie okazis kafumado en la bela naturo. Dum la merkreda kaj ĵaŭda ekskursoj lerte kaj interese rakontis pri la vidindaĵoj kaj pri ortodoksaj kutimoj Jukka Laaksonen.

Marde vespere Atilio prelegis pri Ameriko en la okuloj de eŭropanoj de la XVI-a jarcento kaj poste elementkursano Osmán Lucero Anzures rakontis pri sia lando, Meksiko. Krome Osmán regalis nin per bongustaĵoj, kiujn li kunportis rekte el Meksiko. La vespero estis parte trilingva, kiam Atilio tradukis la hispanlingvan paroladon de Osmán esperanten kaj Tiina de Esperanto finnen. La tuta kurso eĉ prezentis sin trilingve ekzemple: Mi estas Osmán de Meksiko, soy Osmán de México, olen Osmán Meksikosta.

Merkrede eblis saŭni en vera finna fumsaŭno en 13 km distanco de la monaĥejo kaj ankaŭ konatiĝi kun antaŭa domego de arbarlaboristoj. Niaj eksterlandaj gastoj saŭnis tiel brave, ke ili eĉ ricevis diplomojn. Ĵaude la elementkursanoj

kun kelkaj aliaj amuzigis ĉiujn, kiam ili ludis en la teatraĵeto *Aventuro ĉe marĉo*. Temis pri teksto laŭtlekata kaj aktorita laŭ ordonoj. La legado okazis trilingve: esperante, finne kaj hispane por ke ĉiuj, kaj la aktoroj kaj la publiko, komprenu pri kio temas. Vi povas nur imagi la ridadegon. Pri la muzika kaj poema flanko de la vespero respondicis Anja kaj Tiina, kiuj deklamis, kantis kaj ludis.

Do, ankaŭ ĉi-jare ni povas esti tre kontentaj kun la Valamo-kursosemajno. La Popola instituto ricevis la Sanktan Biblion en Esperanto, kiu bone kompletigas ilian kolekton de esperantlingvaj libroj. Ili bonvenigas nin denove al Valamo venontjare: la kursosemajno estos 4.-8.7. 2005 kaj Atilio denove pretas instrui. Pliaj informoj aperos en Esperantolehti kaj en aliaj komunikiloj.

Tiina Oittinen

Raportoj de partoprenantoj de la Esperanto-Simpozio en Valamo 05-09 Julio 2004

Amnezio en Valamo

Kelkaj el la partoprenantoj de la Simpozio en Valamo komence de julio suferis pro subita forgesemo. En iliaj paroloj mankis vorto kiel *laboro, nenio, ĉio*. Iu preleganto ankaŭ forgesis iri al la podio por sia prezento. La redaktejo esperas, ke la epidemio ĉesos post la Simpozio.

Paŭla Tilio kaj Ĥimena Gonzales

Mirinda maskofesto

Unu tagon la partoprenantoj de la Simpozio ĝuis balon. Temis efektive pri maskofesto. La plej mirindaj maskoj aperis sur la vizaĝoj de la simpozianoj. Ili fariĝis preskaŭ ne identigeblaj. Virinoj portis plej ofte etajn ĉapelojn kun diversaj

ornamaĵoj, ekzemple plumoj kaj araneoj. La viraj ĉapeloj prezentis la diversajn aspektojn de la nuna somera modo: de la somera pajloĉapelo ĝis ĉapelo de flandra sinjoro. La balo finiĝis per dancado. Ludis loka orĥestro.

Ĝina Tovar kaj Patricia Sennomul

Kronprinco restis en monaĥejo

Kronprinco Abdul Raŝid intencis partopreni simpozion pri ĉevaloj en Valamo, sed tiom entuziasmiĝis pri la monaĥejo, ke li konvertiĝis en la ortodoksan religion kaj volas fariĝi monaĥo. Nun li vivas en ĉelo de la monaĥejo kaj poste transloĝiĝos en ermitejon en la arbaro. Li ordonis al sia korpogardisto Petriko, ke li sekvu lian ekzemplon.

Ĉela Dali kaj Marko Jalustila

Interesa renkontiĝo

En la monaĥejo de Valamo okazis interesa Esperanto-Simpozio. Dum la kurso la lernantoj lernis la lingvon kaj iom post iom la tuto ŝanĝiĝis al teatraĵo. La ĉefrolojn ludis ses personoj. Ili sukcesis tiel bone, ke ĝi fariĝis krimdramo. Aperis diversaj falsaj personoj kaj objektoj, pro kio la partoprenantoj ridis kaj eĉ ridegis. Finfine neniu sciis kio okazis.

Ĵeromo Le Trotteur kaj Ĉen Danĉing

Horoskopoj

La partoprenantoj duope faris interesan ĉinan horoskopon al infanoj el diversaj landoj. Ekzemple la ŝafo havos feliĉan vivon kun la edzo kaj kvin infanoj... sed bedaŭrinde ŝi ne havos longan vivon.

*Fajruz Jasmen Faraŝa Bukbar
kaj Ĝizella Ĝillet*



En la bildo estas: Eila Martin, Toini Oittinen, Jukka Laaksonen, Varpu Karo, Kauno kaj Eini Kilpinen, Päivi Saarinen, Terhi Laaksonen kaj Osmo Kaplas – sed ne en ĉi tiu ordo. Divenu, kiu estas kiu! (Foto: Eini Kilpinen)

Turneo en Turku kaj Raŭmo antaŭ la Valamo-kurso

La ĉefinstruisto de Valamo-kursoj Atilio Orellana Rojas alvenis kun sia amiko kaj elementkursano Osmán Lucero Anzures al Finnlando jam kelkajn tagojn antaŭ la ĉi-jara kursosemajno por turnei en Turku kaj Raŭmo. Ili estis invitataj kiel gastoj de Esperanto-Societo en Turku (EST) kaj de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF). La EAF-parto de la turneo okazis kadre de la projekto Al kvalita komunikado.

Jam antaŭe estis sendita gazetara komuniko al la regionaj gazetoj en Turku kaj Raŭmo. La kontaktpersonoj estis Anna Ritamäki de EAF, Tiina Oittinen kaj Anna-Liisa Ali-Simola de EST kaj Tuomo Grundström de Raŭmo. La ĉefa svedlingva ĵurnalo en Turku/Åbo, Åbo Underrettelser raportis surbaze de la komuniko kaj aperigis la artikolon kun bildo de Atilio. Ĝi aperis sub la titolo Fakulo pri Esperanto vizitas en Turku (Esperantoexpert på visit i Åbo) vendrede 2.7.2004, do la saman tagon kiam la gastoj alvenis al Turku.

Turun Sanomat, la ĉefa finlingva ĵurnalo en Turku, intervjuis Atilion kaj turkuajn esperantistojn la saman vendredon en la muzeo de Wäi-

nö Aaltonen. Sur la muro de la muzeo estas hakita la poemo de Wäinö Aaltonen ankaŭ esperante apud la aliaj lingvoj. Wäinö Aaltonen (1894-1966) estas la plej konata kaj aprezita skulptisto en Finnlando, liaj skulptaĵoj ornamas i.a. la Finnlandan parlamentejon. La artikolo aperis en Turun Sanomat 20.7.2004 kun bildo de Atilio antaŭ la esperantlingva poemo. Ĝi estis titolita Esperanto estas tuta kulturo (Esperanto on kokonainen kulttuuri).

En Raŭmo la gastoj kaj la finnaj esperantistoj estis intervjuitaj de Länsi-Suomi, kiu estas la ĉefa regiona ĵurnalo. La artikolo, kiu multflanke prezentis Esperanton kaj la gastojn, aperis 4.7.2004. La titolo estis plursenca: Esperanto liikuttaa ympäri maapalloa – Esperanto movas ĉirkaŭ la terglobo – ne nur fizike sed ankaŭ kortuŝante. En la bildo aperis gaja grupo en la loka kafejo: krom la Atilio kaj Osmán enestis Tuomo, Tiina kaj Paula.

Krom la ĵurnalistoj, Atilio kaj Osmán renkontiĝis kun la lokaj esperantistoj kaj kun aliaj homoj interesitaj pri la internacia lingvo. En Helsinki ilin akceptis ĉe la oficejo Taneli Huusko- ▷

Esperantokurso en Valamo 2004

Jam tradicie la ortodoksa monaĥejo de Valamo akceptis nin esperantistojn por studi kaj refreŝigi la lingvoscion. La sugestopedia kurso al kio ni partoprenis estis vere interesa kaj entuziasmiga, dank' al nia bonega kaj ĉiam bonhumora instruisto Atilio Orellana Rojas.

Laŭ la paperoj kiujn li disdonis al ni, ni ĉiuj havis nomitan rolon en la teatraĵo kiun ni dum la tagoj kompletigis kaj finfine en la grupoj faris pri ĝi kvar diversaj rakontoj. Dum unu leciono ni kaŝis nin malantaŭ maskoj kaj tio kaŭzis grandan gajecon inter ni.

Nia bona kursogvidanto Tiina ĉion sperte aranĝis, ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo kie nin lerte gvidis Jukka Laaksonen kaj komunaj vesperoj kun la interesa programo. Pere de Osmán, kiu alvenis al elementa kurso el Meksiko ni konatiĝis al lia lando kaj kutimoj, eĉ havis eblecon gustumi la bongustaĵojn kiujn li kunportis el Meksiko.

La Popola Instituto de Valamo estas bonega kursoloko, kaj ni esperas ke tie ni povus vidi unu la aliajn ankaŭ en estonteco.

Ĵeromo kaj Ĥimena

Kiel evoluis Asorti

Muzikensemblo Asorti fondiĝis en la jaro 1992, kiam geedzoj Elena kaj Edvard kun 6-jara filo Edgar – “Tri-E” – elpaŝis en Kaunas dum E-kongreso. Dum tiu tempo nia familio ne estis esperantistoj, nur lernis kelkajn E-kantojn kaj kantis dum kongreso. Post la koncerto prezidanto de firmao ”Monda turismo” Andreo Gzhibovskij venis al ni kaj parolis esperante. Ni timiĝis, ke ne komprenis, kaj forkuris hejmen. Nia amiko esperantisto transdonis al ni, ke ni estas invitataj al Pollando por koncerti. En soveta tempo tio estis tre alloga, kaj ni komencis prepariĝi.

Nia unua eksterlanda E-vojaĝo estis tre interesa, ni renkontis tie Rene Triole el Francio, kiu

donis al ni la unuan lecionon de esperanto. Ŝi parolis kun ni tutan nokton, ni estis sorĉitaj, ke esperantistoj estas tiel afablaj kaj koraj homoj. Ni revenis hejmen, kaj decidis, ke esperanto estas tre grava parto de nia vivo.

Sekvis vojaĝo al Belorusa E-konferenco (1993), kie estis tre sincera akcepto de nia prezentado kaj konatiĝo kun nepo de L. Zamenhof el Francio. Ni ĝojis denove lin renkonti en Kaunas dum malfermo de E-domo (1993), kie post la koncerto ni ricevis de li donacon – la kasedon de fama franca kantisto.

Somere 1993 ni estis en Pollando en la urbo Klodzko, kie startis la festivalo de E-kanto, kie nia juna Edgar gajnis la unuan premion. Poste



▷ nen, nuna prezidanto de EKH. Dum la intervjuo en WA-muzeo en Turku ĉeestis krom la prezidantoj de EAF kaj EST ankaŭ aliaj esperantistoj kaj pliaj venis vespere al la societa renkontiĝo en la fama Koulu (iama lernejo, nun bierfarejo kaj restoracio). En Raŭmo la gastigantoj estis Tuomo Grundström kaj Paula Niinikorpi, sed

ankaŭ aliaj esperantoŝatemuloj venis babili kun la gastoj kaj aŭdi la lingvon. En ambaŭ urboj Atilio kaj Osmán konatiĝis kun vidindaĵoj, en Raŭmo kompreneble kun la puntofarado kaj en Turku i.a. kun la scenejo de la somera teatro.

Tiina Oittinen

dum 10 jaroj ni estis kunorganizantoj de tiu internacia festivalo. Interesa evento por nia familio estis elpaŝo dum E-forumo en Budapeŝto (julio 1994), kie ni vidis multajn interesajn artistojn kaj kantistojn.

Decembre 1994, Internacia Festivalo en Germanio, ni havis koncerton, kaj tio similis al vintra fabelo. Multe da amikoj, animaj renkontoj. Post la festivalo ni havis grandan rondvojaĝon tra Germanio, kaj revenis hejmen malgraŭ invito daŭrigi la koncertojn, ĉar estis tempo por labori. En la jaro 1995 danke al sinjoro Marcel Delforge, kiu aŭdis nin en Germanio, ni estis invititaj elpaŝi dum UK en Tampere.

Finnlando ĝis nun por ni estas revo. Tutan tempon, pasintan tie, ni pensis pri tio, ke Finnlando estas nia amo por ĉiam. Ĉiuj niaj rakontoj en Litovio al amikoj, kie ni estis kaj kion ni sentis, estis afablaj kaj plenaj de varma sento. Intere, niaj finnaj amikoj ankaŭ amas Litovion, verŝajne naturo kaj homoj estas tre similaj.

Kiam ni denove estis en la jaro 2002, ni komprenis, ke ni malmulte vidis dum la unua fojo, kaj nia amo fariĝis tute fajra.

Edgar kreskis kaj komencis ludi la gitaron. Nun li studas en Moskva Universitato juron, laboras kiel sonteknikisto en Junulara Kulturdomo, Visaginas. Ni kun edzo estas instruistoj de muziko en sama Kulturdomo, ĉiuj tri ludas kune dum festoj. Krome ni havas propran telestudion, ankaŭ ĉiuj laboras en loka TV.

Antaŭ nelonge ni aĉetis konstruaĵon, kie ni planas aranĝi E-domon, telestudion kaj muzikstudion. Estas problemeto – riparigi la domon. Sed ni kredas, ke tio nepre realiĝos.

Nun ni tre ĝojas, ke aperis ebleco denove viziti Finnlandon, ni dankas al Onni Kauppinen, nia bona anĝelo, nia feliĉo. Ni salutas niajn amikojn, amas vin ĉiujn kaj atendas novan renkonton. Ĝis baldaŭ!

Asorti



UEA-membroj elektis komitatanojn B

Entute 1491 individuaj membroj de UEA uzis ĝustatempe sian rajton voĉdoni en la plej grand-skala regula referendumo de la Esperanto-komunumo por elekti ses Komitatanojn B de UEA por la periodo 2004-2007. El 5140 dissenditaj balotiloj revenis 29,0%. Sekve la balot-aktiveco restis iom sub tiu en 2001, kiam ĝi estis 31,4%.

La voĉoj estis nombritaj en la Centra Oficejo la 1-an de julio. Partoprenis la membroj de speciala komisiono elektita de la Estraro de UEA. Ĝi konsistis el la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller kaj la individuaj membroj Simo Milojevic, Rob Moerbeek kaj Piet Schuil. En Ĝia naŭ-hora tasko la komisionon asistis individua membro Francisco L. Veuthey, oficistoj Marcus Sikosek kaj Stanka Starcevic, kaj volontulo de TEJO Joel Amis.

Plej multe da voĉoj rikoltis István Ertl (Belgio), eksredaktoro de la revuo "Esperanto". Kun 882 voĉoj li ankaŭ estis la sola kandidato, kiun apogis plimulto de la balotintoj. Aliaj sukcesaj kandidatoj estis Amri Wandel (Israelo) kun 720 voĉoj, Marija Belosevic (Kroatio) kun 605, Lee Chong-Yeong (Korea Resp.) kun 602, Jukka Pietiläinen (Finnlando) kun 565 kaj Slavik Ivanov (Rusio) kun 546 voĉoj. Wandel, Belosevic kaj Lee membris ankaŭ en la malnova Komitato, dum Ertl, Pietiläinen kaj Ivanov eniros la superan organon de UEA kiel novaj membroj. La 26-jara Ivanov estas de longe la plej juna kandidato, kiu sukcese trairis la balot-elprovon de la membraro de UEA. La averaĝa aĝo de la elektitoj estas 44 jaroj.

La ceteraj kandidatoj ricevis voĉojn jene: Yves Bellefeuille 535, Chuck Smith 534, Wu Guojiang 525, Hokan Lundberg 480, Jose Antonio Vergara 450, Philippe Chavignon 422, Choi Yunhuy (Hortensio) 419, Ivo Osibov 359, Diccon Masterman 347 kaj Francisko Simonnet 233. Estis entute 1485 validaj kaj 6 malvalidaj balotiloj. *(el komuniko de UEA prenis mm)*

Nova UEA-estraro elektiĝis en Pekino

Inter la taskoj de la nova komitato de UEA en Pekino dum sia unua kunsido sabaton la 24an de julio estis elekti novan estraron.

Prezidos la organizon por plia trijara periodo Renato Corsetti, Italujo. Vicprezidanto estos Claude Nourmont, Francujo, ĝenerala sekretario Ulla Luin, Svedujo. La aliaj anoj de la estraro estas Ans Bakker-ten Hagen, Nederlando, kiu ankaŭ estis en la malnova estraro, Maritza Gutierrez, Kubo, Amri Wandel, Israelo, kaj Yu Tao, Ĉinujo.

En la komitatkunveno partoprenis de Finnlando Jukka Pietiläinen, B-komitatano, kaj Tuula Virolainen kiel anstataŭanto de la komitatano A de EAF.

(amr)

Jarlibro 2004 aperis

Portreto de Cecil Charles Goldsmith, iama ĝenerala sekretario de UEA, malfermas la ĉi-jaran Jarlibron. La multjara prezidanto kaj vicprezidanto de la Asocio, prof. Humphrey Tonkin, rememoras en ĝia antaŭparolo, kiel "Tiny" Goldsmith profunde impresis lin kiel 15-jaran junulon.

En la unua parto de la Jarlibro aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, same kiel pri landaj, fakaj, edukaj kaj kulturaj organizaĵoj, bibliotekoj k.a. establoj. Oni trovas ankaŭ la Esperanto-rezoluojn de Unesko kaj la bazajn gvidliniojn de UEA pri informado pri Esperanto.

Du trionoj el la 288-paĝa libro konsistas el la adresaro de la Delegita Reto de UEA kun 1783 individuoj en 92 landoj (1945 en 98 landoj en Jarlibro 2001, kiu laste enhavis detalan statistikon). La fakaj delegitoj reprezentas ĉ. 800 fakojn. Kvankam la nombro da delegitoj lastatempe emis malkreski, la Centra Oficejo antaŭvidas, ke ĝi denove kreskos por la Jarlibro 2005 kiel rezulto de planata kampanjo lige kun la laŭvica

revizio de la Delegita Reto, kiu startos en oktobro.

En la ĉi-jara Jarlibro sian retadreson publikigas 1129 delegitoj, t.e. 63% el la tuta delegitaro. En kvin jaroj ilia nombro duobliĝis.

(el komuniko de UEA mallongigis mm)

Retpaĝo por lokaj grupoj

Lu Wunsch-Rolshofen de EsperantoLand.org informas, ke ĉirkaŭ ducent el la Esperanto-grupoj troviĝas nun, ofte kun sinprezento, sur la grupaj mapoj ĉe <http://EsperantoLand.org/grupoj/>. Fakte temas pri la ttt-ejo, kie kolektiĝas informoj pri Esperanto-grupoj, kiuj ŝatas ricevi vizitantajn esperantistojn.

Memoru krome, ke por helpi la laboron pri la kontaktoj inter la esperantistoj loĝantaj en ĝemelaj urboj, pri kiu zorgas Wu Guojiang, amikeco999@21cn.com, estas alia ttt-ejo, http://www.aliaflanko.de/lokaj_grupoj/, kie estas la informoj pri la grupoj kaj samtempe pri la urboj, kun kiu ĝemelas la urbo, en kiu estas la registrata grupo. En tiu ejo nun estas 64 grupoj. La programo estis farita de Karin Weirich, en la ttt-ejo de ŝi kaj de Robert Bogenschneider.

Bonvolu registri vian grupon ĉe la supremenciitaj retpaĝoj.

Thorsen-apogo por bibliotekoj

UEA disdonos jam por la oka fojo subvenciojn al Esperanto-bibliotekoj el la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen.

Rajtas peti subvencion Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La subvencipetojn devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigita laŭ prefero. Diskoj, sonkasedoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. La subvencio oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, kiu akompanis la peton.

La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA plej laste la 1-an de novembro 2004.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Eraroj en NPIV, ĝustiga listo

En la hejmpaĝo de SAT <<http://www.sat-esperanto.org>> nun estas elŝutebla pdf-dokumentoj kun la "korektoj de eraroj kiuj troviĝas en la Nova PIV". Do, ĉiuj esperantistoj kiuj posedas "Novan PIV" kaj retaliron, povas elŝuti ĝin senpage.

(La SAT-oficejo)

"Juna Amiko" kaj "Lernu" kunlabore

La gazeto por komencantoj kaj lernejoj, Juna Amiko, anoncas novan mult-lingvan hejmpaĝon, kiu entenas artikolojn el la revuo. La paĝaro gastas ĉe la hejmpaĝo de "Lernu", komuna projekto de TEJO kaj ILEI, kiu estas nur unu el pluraj pruvoj pri fortigata kunlaboro inter la junulara kaj instruista organizoj.

La hejmpaĝaro Lernu enhavas plurajn kursojn, lernilojn, ekzercojn kaj babilejon por vizitantoj. Por vidi la paĝaron de Juna Amiko, iru al <www.lernu.net> kaj vizitu la bibliotekon per la maldekstra indekso. La paĝaro de Juna Amiko estas plukonstruata.

(Stefan MacGill, mallongigita de mm)

Seminario kunigis sciencistojn kaj esperantistojn

Renomaj sciencistoj, verkistoj kaj esperantistoj kolektiĝis en julio en norda Finnlando en seminario por diskuti lingvajn homajn rajtojn, lingvan subpremado kaj la rolon de malgrandaj lingvoj en la Eŭropa Unio. Laŭ Jukka Pietiläinen, kiu mem prelegis dum la seminario, la konataj esploristoj Robert Phillipson kaj Tove Skutnabb-Kangas rilatis al la perspektivoj de Esperanto eĉ pli serioze ol pluraj esperantistoj: por ili ne estis dubo pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj ĝia taŭgeco por uzo en la Eŭropa Unio. Legu pli en Libera Folio <<http://www.liberafolio.org>>.

(raportis por NUN: Kalle Kniivilä)

Aŭtunaj Tagoj de EAF en Iisalmi 18.-19.9.2004 Suomen Esperantoliiton syyspäivät Iisalmessa

Kulturo kaj Savo-tipa frenezo – Kulttuurista ja savolaista hulluutta

Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi proksimiĝas – se vi jam ne: aliĝu tuj

Banejo de Runni kaj Iisalmi regiono atendas vin. La bunta programo estis jam en la antaŭa numero 3/2004, en tiu ĉi gazeto vi trovas pliajn informojn pri nia gasta muzika grupo Asorti el Litovio. Baldaŭ indas mendi la trajnajn biletojn kaj informiĝi pri la busaj konektoj. Se vi volus alveni pli frue al Iisalmi, vi povas bonege mendi ĉambron en hotelo Artos, tel. 017-812244. Menciui, ke vi partoprenos en Aŭtunaj Tagoj de EAF. La hotelo situas en Kyllikinkatu 8, en la sama domo kun Evakkokeskus, kien ni kolektiĝos matenmanĝi sabatmatene. Memoru, ke sabate posttagmeze eblas uzi la servojn de Runni-banejo. Rezervu tempon ekzemple al masaĝo rekte el Runni, pli detalaj informoj en la finlingva tekstoparto. Sed plej unue, plenigu la aliĝilon, pagu la kotizon kaj informu nin organizantojn pri via alveno. Kaj ne forgesu la Postaŭtunajn tagojn, kiujn Onni aranĝos. Elkore bonvenon al frenezaj savo-tipaj esperantotagoj!

Iisalmen syyspäivät lähestyvät – jollet vielä: ilmoittaudu heti

Runnin kylpylä ja Iisalmi ympäristöineen odottavat meitä syyskuun puolivälissä. Edellisessä Esperantolehdestä 3/2004 esiteltiin päivien monipuolinen ohjelma; tässä lehdessä lisää tietoja liettualaisesta Asorti-ryhmästä, joka musisoi vieraanamme päivillä. Huomasithan, että lauantai-iltapäivänä on aikaa hyödyntää kylpylän palveluja; varaa itsellesi sopiva hoito suoraan kylpylän hoitovaraustoimistosta, puh. 017-7687525 ja kerro tulevasi Suomen Esperantoliiton syyspäiville. Toimistosta saat tarkemmat tiedot eri hoidoista; kylpylän palveluihin voit

tutustua myös sen nettisivuilla <www.runninkylpyla.fi>.

Liikenneyhteyksistä kannattaa jo nyt ottaa selvää. Kolme täysin maksavaa saa ryhmälennuksen ja lisäksi ovat tietenkin käytettävissä myös muut liikennöitsijöiden alennukset. Jos haluat lähteä jo aikaisemmin Iisalmeen, voit hyvin majoittua esim. hotelli Artokseen, puh: 017-812 244. Hotelli sijaitsee samassa talossa kuin Evakkokeskus, jossa on tarjolla lauantai-aamun aamiainen junalla tulijoille: osoite on Kyllikinkatu 8. Mainitse varatessa tulevasi Suomen Esperantoliiton syyspäiville.

Äläkä unohda Onnin järjestämää Postaŭtunaj Tagoj -tapahtumaa, jos ehdit viipyä pitempään Iisalmessa. Elämykset jatkuvat silloin.

Tervetuloa savolaisen hulluuden (ja tietysti myös esperanton) päiville!

Kontaktpersonoj/yhteyshenkilöt:

EAF: Tiina Oittinen kaj Päivi Saarinen (vidu paĝo 2/tiedot sivulla 2); Esperantoklubo de Iisalmi: Onni Kauppinen, tel/puh: 0500-813530, onni.kauppinen@pp.inet.fi.



Hotelli Artos ja Evakkokeskus.

Esperanto-Societo en Turku vizitos la Artan Muzeon

En la Arta Muzeo de Turku estas denove vizitinda ekspozicio: temas pri verkoj de famaj fratoj von Wright, kiujn ĉiuj konas de iliaj birdoj. Sed la fratoj Magnus, Wilhelm kaj Ferdinand pentris ne nur birdojn, sed ankaŭ aliajn bestojn kaj pejzaĝojn. Ili ĉiuj estis kaj artistoj kaj natursciencistoj kaj kvankam oni ofte parolas pri ili kiel unu kaj la sama persono, ili kompreneble estis individuoj kaj havis ĉiuj propran vivon kaj stilon. La vizito de EST-anoj kun geamikoj en la Arta Muzeo de Turku okazos merkredon, la 25-an de aŭgusto je 17.00. Esperant- kaj finnlingve ĉiĉeronos Leena Tiusanen kaj Tiina Oittinen.

Turun Esperanto-yhdistys vieraillee keskiviikkona 25.8.2004 klo 17.00 Turun Taidemuseossa Vartiovuorenmäellä. Leena ja Tiina opastavat esperantoksi ja suomeksi taidemuseon kesänäyttelyn: Luonnollisesti - veljekset von Wright.

Bonvenon ankaŭ gastoj! Tervetuloa mukaan!

ELFI

Alvoko al membrokunsido

La membroj de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj estas invitataj al kunsido, kiu okazos sabate la 18an de septembro 2004 je 12.30 en Banejo de Runni, Iisalmi. Ni decidis pri la membrokotizoj laŭ nova sistemo.

La estraro

Kutsu jäsenkokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistyksen jäsenet kutsutaan kokoukseen 18.9. klo 12.30 Runnin kylpylässä, Iisalmessa. Päätetään jäsenmaksujen suuruudesta 2005 uuden järjestelmän mukaan.

Johtokunta

ALIĜILO Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 18.-19.9.2004.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Retadreso _____

Aliĝkotizo:

16 e ĝis 31.8.2004 _____

20 e ekde 31.8.2004 _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

La kunvena paketo 18.-19.9. (tranokto, manĝoj laŭ la programo)

72 e dulita ĉambro/Runni _____

92 e unulita ĉambro/Runni _____

54 e dulita ĉambro/Metsäpirtti _____

32 e nur manĝopaketo _____

(manĝoj laŭ la programo sen matenmanĝo)

Mi venos la ___ / ___ 2004 je _____

per _____.

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: **Sampo 800017-230825.**

Bv. uzi la Aŭtunaj tagoj referencnumeron **4640.**

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarekatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

aŭ la informoj rete al: eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Syyspäiville 18.-19.9.2004.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Osallistumismaksu:

16 e 31.8.2004 saakka _____

20 e 31.8.2004 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Kokouspaketti 18.-19.9. (majoitus, ohjelmaan merkityt ruokailut)

72 e 2 hengen huone/Runni _____

92 e 1 hengen huone/Runni _____

54 e 2 hengen huone/Metsäpirtti _____

32 e vain ruokapaketti _____

(ohjelman ruokailut ilman aamiaista)

Saavun ___/___ 2004 klo _____

_____lla.

Yhteensä maksettava EAF:n tilille _____

Maksut EAF:n tilille: **Sampo 800017-230825** käyttäen Syyspäivien viitenumeroa **4640**.

Lisätietoja tai toivomuksia:

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki
tai tiedot osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi
TERVETULOA!

Estraro kunvenis

La estraro kunvenis (kunsido 5/2004) en la oficejo la 6an de junio 2004 je 11.20 - 16.40.

Ĉeestis Anna Ritamäki, Taneli Huuskonen, elektita por tiu ĉi-foja kunsida sekretario, Tuomo Grundström, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, Auli Vihermä, Timo Pirinen, librotenisto de EAF Paula Niinikorpi kaj dum la trakto de la gazetaj aferoj ankaŭ ĉefredaktoro Mikko Mäkitalo.

Al esperantokursoj en la instituto de Valamo aliĝis ĝis la kunsido 16 kursanoj, sufiĉaj por ke la instituto pagu salajrojn kaj enlandajn vojaĝkostojn de du instruistoj. Krome EAF, kiel kuinte, pagas la flugbileton de la ĉefinstruisto Atilio Orellana Rojas. Kiel lastjare la instituto prizorgas senpagan restadon kaj vojaĝkostojn por la kursorespondeculo Tiina Oittinen. Sekvajare la kurso okazos 4.-8.7.2005.

Rilate al antaŭkurso turneo de Atilio kun Osmán Lucero Anzures (elementkursano) al Turkuo kaj Raŭmo la estraro decidis pagi la kostojn por la vizito en Raŭmo kadre de la projekto Al kvalita komunikado. La loka e-societo invitis ilin al Turkuo kaj respondecas pri tiu parto de la kostoj.

EAF ricevis inviton al la KEF-komitato. EAF dankas pro la invito al la KEF-komitato kaj bonvenigas la iniciaton pri organizado de Kultura Esperanto-Festivalo en 2005. La asocio volonte kunlaboros kun FEJO kaj eventualaj aliaj organizantoj de KEF. La estraro decidis ke EAF tamen ne estu organizanta asocio kun financa aŭ jura respondeco. Taneli Huuskonen estis, nome de EAF, nomumita observanto al la KEF-komitato.

La estraro konstatis la dezirindecon de karavano al la UK en Vilno 2005. La ekveturo okazu tiel, ke la karavano estu en Vilno plej laste la unuan tagon de la kongreso, sabaton la 21-an de julio. Krome la estraro diskutis la ideon pri evento en Raŭmo dum somero 2005 kaj venis al la konkludo ke ne eblas fari decidon sen scii

pli pri la KEF-planoj, ekzemple pri datoj kaj daŭro de KEF.

La estraro diskutis diversajn aspektojn de la redaktado de Esperantolehti. Por klarigi la respondecojn la estraro decidis rekoncepti la rolon kaj konsiston de la redakta grupo. La redakta grupo konsistu el la prezidanto de EAF, la ĉefredaktoro kaj la teknika redaktoro. Ili faru decidojn koncerne la revuon, interalie pri enhavo kaj pri senpageco de anoncoj. Krome ekzistas listo de kunlaborantoj kiuj pere de la redakta retlisto daŭre ricevas informojn kaj povas kontribui al la gazeto.

EAF ricevis subvenciojn de la edukministerio por Esperantolehti ankaŭ ĉi-jare: 1 000 eŭrojn. Temas pri subvencio por kulturgazetoj (Avustukset kulttuurilehtien tukemiseen ja jakeluun).

La estraro decidis ke la redakta grupo kune kun la librotentisto kaj la kasisto kunsidu por kune prepari buĝeton de Esperantolehti 2005. Tiam estu pritraktataj ankaŭ aliaj financaj aspektoj de la gazeto, ekz. abonkotizoj kaj subvencirilataj respondecoj. Ĝis la trakto pri la sekvajara buĝeto la redakta grupo rajtas fari decidojn pri redaktaj kostoj kadre de la valida EAF-buĝeto.

La firmao Hetta Silver el Enontekiö ofertis al EAF arĝentajn broĉojn en formo de la jubilea simbolo. La estraro decidis havigi 60 malgrandajn kaj 40 grandajn broĉojn. La vendoprezos estos 12 eŭroj kaj 30 eŭroj.

Rilate al la komunikadprojekto Al kvalita komunikado (AKK) la estraro konstatis ke la raporto pri la unua fazo kun plano por la dua fazo estis senditaj al Fondumo Esperanto -säätio (FES), kiu plufinancos la projekton tiel ke dum la dua fazo (aprilo 2004 – marto 2005) uzeblas 9800 eŭroj. Krome la estraro iom diskutis pri la sekvaj paŝoj, i.a. biblioteka konsilgrupo kaj trejnseminario.

La estraro traktis la preparojn de Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi. Kiel eblaj lokoj por Vintraj Tagoj estis menciitaj Tampere kaj Turku.

Anna Ritamäki estis renomumita kiel komitatano A de EAF por 2004-2007. Ŝi tamen ne voj-

aĝos al la UK en Pekino. La estraro rajtigis ŝin trovi anstataŭanton inter la finnlandanoj vojaĝontaj al la UK. La anstataŭanto devas plenumi la kondiĉojn de komitatano, esti individua membro dum la nuna kaj du antaŭaj jaroj.

La historia laborgrupo kunvenis en la oficejo 23.4.2004. Ili interalie vizitis la stokejon.

La sekva kunsido okazos sabaton, la 28-an de aŭgusto 2004 je 11.00 en la asocia oficejo. (La raporton kompilis la prezidanto surbaze de la protokolo.)

Pli klaraj redaktaj respondecoj

La ĉefredaktoro estis speciale invitita gasto de la estrarkunveno de EAF en junio. La celo de lia vizito estis tutestrara trakto de gravaj temoj ligitaj al Esperanta Finnlando, interalie pli klara difino de respondecoj pri la redaktaj aferoj. Iujn aferojn ni sukcesis fiksi, kvankam, kompreneble ni ne sukcesis ĉiujn gravajn aferojn trakti – ja la gazetaj aferoj estas tre multflankaj: enhavaj, teknikaj, financaj, distribuaj ... Ni progresos, kiel pri ĉio, paŝon post paŝo.

Dum la ĉefredaktora periodo de Aimo Rantanen ni enkondukis aron da kunlaborantoj, kiuj kune faris la gazeton tiel faciligante la redaktan laboron. Tiuj kunlaborantoj estas rete kunligitaj per retlisto *esperantolehti-redakto* ĉe Yahoo-groups, kiu ankaŭ estas la listo al kiu estas distribuitaj ĉiuj mesaĝoj senditaj al la redakta adreso *eaflhti@esperanto.fi*. Ni nun konstatis ke estas korekte nomi ĉiujn tiujn homojn “konstantaj kunlaborantoj” dum prefere ekzistu pli malvasta “redakta grupo”, kiu havu la konkretan respondecon pri la enhavaj aferoj kaj ankaŭ povu fari decidojn kun financaj sekvoj.

Ni decidis ke la redakta grupo konsistu de la tri personoj, kiuj praktike jam gvidis redaktadon: la ĉefredaktoro Mikko Mäkitalo, la teknika redaktoro Ilkka Santtila kaj la prezidanto de EAF, kaj sekve respondeca redaktoro en la senco de la leĝo, Anna Ritamäki. ▷

Al kvalita komunikado

EAF-projekto por levi la kvalitan nivelon de la informa agado
(finne: *Laatua viestintään, svede Kvalitet i kommunikationen*)

Al kvalita komunikado – kiel partopreni?

La projekta grupo de *Al kvalita komunikado* kunvenis en la oficejo la 20an de julio. Ni interŝanĝis ideojn kaj okupiĝis pri konkretigo de niaj planoj por la nuna jaro. Pri la ĝisnunaj sukcesoj ni aparte kontentis pri la realigo de la enketado al la EU-kandidatoj. Unuafoje la prezidanto de FEJO Patrik Austin partoprenis, kio kontribuis tre pozitive al la etoso de la kunveno. FEJO havas multajn interesajn informajn planojn, interalie pri kontaktoj kun aliaj neregistraj junularaj organizaĵoj. Tre ĝojiga estas ankaŭ la amaskomunikila atento al la bando Dolchamar – eĉ dum la AKK-kunveno Patrik ricevis telefonalkvokojn al intervjuoj...

En la kunveno ni decidis pri gvidlinioj por partopreno en AKK (vd. apudan paĝon).

La nuna konsisto de la projekta grupo:
Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Päivi Saarinen,

▷ **Asocia organo – kaj anoncorgano**

Inter la diskutitaj temoj estis ankaŭ la anoncpolitiko de la gazeto. Principe anoncoj de EAF, inkluzive de ties membroasocioj, estu senpagaj, sed ni ankaŭ deziras pagitajn anoncojn, prefere ankaŭ de neesperantistoj.

Eblas pensi ke ĉiu informo, kiu estas komerca aŭ ne rekte informanta pri membroasocia afero, ĉiam estu pagita anonco. Tamen povas esti kazoj kiam ni volas subteni iun agadon per senpaga anonco. Nun la redakta grupo ricevis la taskon fari motivigitan decidon kaze de publikigo de senpagaj anoncoj.

Anna Ritamäki

Jukka Pietiläinen, Markku Saastamoinen kaj Tuomo Grundström. La prezidanto de FEJO estas daŭra observanto.

Ni kune levu la kvalitan nivelon de la informa agado!

Anna Ritamäki

Tri agadkampoj – pri kio temas?

La projekta plano difinis tri agadkampojn, pri kiuj ni agadas paralele kaj interlige. Ni nomis ilin informa strukturo, trejnado de la membraro kaj informa laboro, sed retaksante la planon por la dua fazo la projekta grupo decidis, cele al plia klareco, ŝanĝi la nomon de la tria agadkampo al alekstera informado. La klarigaj frazoj pri la tri kampoj restas la samaj.

La disdivido funkcias kontentige kiel gvidilo por la projekta agado. Kvankam la kampoj ne estas reciproke ekskludaj – la sama konkreta agado havas rezultojn diversgrade por ĉiuj agadkampoj – la disdivido koncepte antaŭenigas la komprenon pri la celoj de la projekto.

La tri agadkampoj de Al kvalita komunikado:

1. Informa strukturo. Superrigarda kaj sistemiga laboro, kiu celas krei bazon por analizo de la stato de nia informa agado kaj sekve konduki al informa strategio de nia asocio.

2. Trejnado de la membraro. Konscia agado por trejni niajn membrojn pri informa agado kaj por pliklerigi ilin pri la diversaj facetoj de la fenomeno Esperanto vastasence.

3. Alekstera informado. Kontribuo al pli vasta rekono de la valoroj de Esperanto kaj al pli bona ĝenerala nivelo de scioj pri nia lingvo en Finnlando.

Gvidlinioj por partopreno en AI kvalita komunikado

Ĉu vi aŭ via klubo havas ideon aŭ planon, kiu povas kontribui al kvalita komunikado? Eble vi ŝatus fari prelegserion, produkti informmaterialon, partopreni en kurso por lerni pli pri informado aŭ starigi standon. Eble vi ŝatus krei kontaktojn kun aktivuloj de aliaj movadoj. Ne gravas ĉu vi volas mem organizi eventon aŭ simple partopreni en evento de alia organizanto, ĉu esperantista aŭ "krokodila". Ideojn pri eblaj manieroj partopreni vi trovas ankaŭ en la buĝeto de AI kvalita komunikado.

Pensu libere! Estu iom ambicia – sed ne timiĝu! La gvidlinioj postulas iom da ordo, iom da planado, sed ili estas sekveblaj kaj ili subtenas vin trovi vojon al realigo – verŝajne ankaŭ iom da mono.

La projekta grupo aprobis la sekvajn gvidliniojn por partopreno en AI kvalita komunikado.

Peto kun planpriskribo

enhavu respondojn al la sekvaj demandoj:

Kio? Kie?

– Nomo de la agado (ekz. partopreno en evento X) kaj priskribo de ĝi.

Kiu?

– Respondeca asocio, respondeculo aŭ respondeculoj, ebla taskodivido, ankaŭ kontaktinformoj.

Kiam?

– Temposkemo, se temas pri konkreta evento povas sufiĉi la datoj, sed prefere estu difinita ankaŭ antaŭvidita tempo por planado kaj por pritakso kun raportado.

Kial? Kiel?

– Klara difino de tio kiel la agado rilatas al la celoj kaj agadkampoj (informa strukturo, trejnado, alekstera informado) de AI kvalita komunikado: Kiel ĝi kontribuas al pli kvalita informado? Ĉu atendeblas longdaŭraj rezultoj por la asocio en formo de aktivula trejnado kaj kreo de materialoj aŭ rutinoj por posta uzo?

Kiomkoste?

– Informoj pri financaj bezonoj: simpla buĝeto kun klarigoj kaj konkreta difino de mona subtenbezono de AKK.

Konkretaj postuloj por ĉiu agado kadre de AKK estas:

– Mencio de AI kvalita komunikado lige al la agado, ekz. en gazetaraj komunikoj aŭ enkonduke al prelegoj.

– Raportado (ekz. en formo de artikolo en Esperantolehti kaj livero de produktitaj materialoj al la oficejo).

Normale mono estos elpagita nur post raportado surbaze de prezentitaj realaj kostoj.

Limdaton la projekta grupo ne fiksas. Pli gravas, ke la peto estas klare kaj bone motivigita. Sendu informon sufiĉe frue!

Sendoadreso kaj kontaktpersono: La peton sendu surpapere al la oficejo Esperanto-Asocio de Finnlando/AKK, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki aŭ rete al la adreso *eafoficejo @esperanto.fi*. Tiel la peto atingos la AKK-respondeculon Päivi Saarinen, kiu pludistribuos ĝin al la aliaj projektgrupoj.

La projekta grupo

Buĝeto por la dua fazo de la projekto AI kvalita komunikado

Unua fazo, februaro 2003

– fino de marto 2004

Ricevita subvencio de 7 500 eŭroj, sumaj elspezoj 5 200,72 eŭroj.

Dua fazo, aprilo 2004 – marto 2005

Informa strukturo 4500 eŭroj

- Kunvenoj (vojaĝ- kaj manĝokostoj, eventualaj tranoktokostoj): 2000 eŭroj
- Komunikadaj kostoj (telefonaj, retroŝtaj kaj poŝtaj, multobligado): 700 eŭroj
- Grafika identeco (planado, presado kaj alia utiligo): 1500 eŭroj
- Bibliotekaj kostoj (novaĉetoj kaj aliaj kostoj por biblioteka evoluigo): 300 eŭroj

Trejnado de la membroj 3400 eŭroj

- Trejnseminario: 2000 eŭroj
- Invito de fakuloj: 600 eŭroj
- Partoprenoj en trejnaj eventoj: 600 eŭroj
- Aliaj trejnaj kostoj: 200 eŭroj

Alekstera informado 1900 eŭroj

- Okazigo de informaj eventoj (okazigo de eventoj por ekstera informado): 1000 eŭroj
- Foirpartoprenoj (informado pri esperanto en eventoj okazigitaj de aliaj): 500 eŭroj
- Turneoj kun informa efiko: 400 eŭroj

Sume por la dua fazo 9 800 eŭroj

La duan fazon ni planas financi per la 2299,28 eŭroj restantaj de la subvencio ricevita de Fondumo Esperanto kaj per aldona FES-financado de 7500 eŭroj.

Tria fazo marto 2005 – marto 2006

Ni daŭre taksas ke ni bezonos 10 000 eŭrojn por la tria fazo.

Sume por la tuta projekta periodo 25 000 eŭroj.

Aktivula trejnseminario

Nia sekva trejnseminario de *AI kvalita komunikado* okazos la lastan semajnfino de oktobro (30-31 oktobro 2004), verŝajne en la Orivesi-instituto (Oriveden opisto). Ni invitis eksterlandan ĉefpreleganton: Markus “Ziko” Sikosek, verkinto de *Esperanto sen mitoj* kaj laboranto ĉe la arkivo kaj biblioteko de UEA en Roterdamo.

La trejnseminario celas kontribui al la celoj de AI kvalita komunikado: fortigi niajn informajn rutinojn, trejni nin por pli koni niajn aferojn por ke ni pli bone povu komuniki ilin.

Invitatoj estas la EAF-funkciuloj kaj du reprezentantoj de ĉiuj membroasocioj de EAF. Ni povas ankaŭ akcepti aliajn aktivulojn kiel partoprenantojn. La AKK-projekto repagos vojaĝ-kostojn de la partoprenantoj laŭ la tarifoj de publika transporto. Verŝajne ne estos partoprenkoto.



Näyttelytaulusto kiertoon – Ĉirkuliĝonta finnlingva ekspozicia tabularo

Rakensimme Jyväskylässä tiedotusnäyttelyn kierrätettäväksi eri pisteissä. Näyttelyn otsikkona on **Esperantoa Jyväskylässä jo yli sata vuotta**. Näyttelyn muodostaa viisi (b = 94 cm, h = 144 cm) omilla jaloillaan seisovaa, kokoon-taitettavaa (1 m * 1,5 m) vaneritaulua, joten ne ovat esim. farmariauton perällä tai kattotelineeläkin kuljetettavissa. Taulujen otsikot ovat nyt: 1. pääotsikon mukainen, 2. **Jyväskylän esperantokerho**, 3. **Esperantomatkailua eri puolilla maailmaa** (kongressikaupungit, osanottajamäärät), 4. **Esperanton opiskelu**, 5. **Suomen esperantoliitto**.

Näitä aiheita voi tietenkin paikkakunnan ja ajan mukaan uudistaa, pianhan esille nousee Suomen Esperantoliiton satavuotius. Julisteet yms. ovat kiinnitettävissä kaksipuolisella tarranauhalla. Sain pari vuotta sitten Raumalta Tuomo Grundströmiltä hyvää tiedotusmateriaalia, kiitos hänelle! Kunhan “väsyn” näyttelyn kiertävämiseen täällä Jyvässeudulla, tarjoan sen “ympäri Suomea” kiertäväksi – ilman palautus-oikeutta! Infoihmiset, tarttukaa tilaisuuteen, taulut sinänsä jo ovat jonkin arvoiset! Ilmoittakaa kiinnostuksenne puhelimitse tai mieluummin etanapostilla Pentti Makkoselle, Ansapolku 1, 40630 Jyväskylä, (puh. 014 254 485).



!!!! HUOM – OBS – NOTU !!!!

Fejolla on uusi tilinnumero:
La nova kontonumero de Fejo estas:

563000-2213606/ Rauman seudun OP

Jos olet saanut tilisiirtolomakkeen vanhalla Nordean tilinumerolla, sen voi edelleen maksaa sinne, mutta muuten kaikki maksut mieluummin uudelle tilille.

!!!! HUOM – OBS – NOTU !!!!

Internacia Festivalo en Magdeburg

Apenaŭ estas la someraj kongresoj pasintaj, dum jam urĝas pensi pri la tradiciaj kongresoj dum jarŝanĝo en Germanio. Internacia Festivalo (IF) okazos en Magdeburg 27 dec 2004 – 3 jan 2005. IF estas aranĝo celata por mezaĝuloj (25-55 jaroj) lingve spertaj. Programo enhavas tage prelegojn, kursojn, promenojn kaj tuttagan ekskurson, vespere koncertojn, dancadon kaj teatraĵon. Ejo en urbocentro proksime fervojan stacion. Aliĝperiodo por nuna kotizo ĝis 30 sep. Aliĝilo haveblas de la ĉefredaktoro, plia informo ankaŭ interrete <<http://www.internacia-festivalo.de>>.

Esperantotemaj artikoloj en aliaj gazetoj

Memoru tuj sendi eltondaĵojn pri esperanto al la oficejo. Tie ili estas tuj arĥivigitaj tiel ke ili estas videblaj por nunaj kaj estontaj vizitantoj de nia oficejo. Ne gravas se ni ricevas pli ol unu de la sama gazetartikolo. Gravas ke ni ricevas la artikolojn, sed eĉ pli bone estas se ĉiu klubo nomumas respondeculon pri artikoloj en la gazetaro. Se vi ne volas sendi la originalon ankaŭ fotokopio bone taŭgas.

IJK-60 – 355 partoprenantoj

En Rusio sukcese pasis la 60-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Entute ĝin partoprenis 355 personoj el 27 landoj. Plej multis, nature, rusianoj – 234 personoj (66%). Sekvas germanoj kaj svedoj – po 13, Francio – 12, Ukrainio – 11, Danio, Hispanio+Katalunio, Pollando – po 8, Italio – 6, Kroatio – 5, Nederlando, Norvegio – po 4, Kazahio, Aŭstrio, Hungario – po 3, Bosnio kaj Hercegovino, Portugalio, Usono, Britio, Irano, Belorusio, Moldavio, Taĝikio – po 2, Slovakio, Kanado (Kebekio), Ĉinio, Finnlando – po 1.

Raportis: Andrej Grigorjevskij en NUN

IJK 2005 en Pollando

En sia lasta ret-estrarkunsido la TEJO-estraro decidis akcepti la proponon de la polaj junaj esperantistoj inviti la IJK-on al Pollando en 2005. Jam ekplanu por somero 2005 – vi povos facile partopreni la KEF:n en Helsinki, UK:n en Litovio kaj IJK:n en Pollando, en tri sinsekvaj semajnoj!

(mm)

Memzorgita renkonteto en Tartu

Pasintprintempe mia lernejo aranĝis malgrandan studan vojaĝon al sia kunlabora lernejo en Tartu, Estonio. Originala intenco estis nur konatiĝi kun la kunlabora lernejo kaj lokaj studentoj, sed la vojaĝo enhavis pli multe esperantorilatojn ol mi antaŭe povis pensi.

Io komencis estiĝi, kiam mi bedaŭris al mia instruisto, ke mi tute ne scias, pri kio mi volas fari mian prelegon, kiun oni devis fari por prezenti al studentoj en Tartu. Ŝi proponis, ke mi faru ĝin pri mia interesa hobbio, esperanto. Bonega ideo, mi certe havas ion por diri pri esperanto!

Dum farado de prelego mi rimarkis, ke eble mi ĝojis iomete tro frue, ĉar mi finfine ne havis tiel multe aferojn diri pri esperanto. Sed evidente

Lempiasioita – Am-aferoj

Fejolaĵoj kaj artikoloj pri lempiasioistoj.

Koonnut: Katja Lampinen.



mi faris tre interesan kaj multedonan prelegon, ĉar la publiko aŭskultis min tiel trankvile kaj kviete, preskaŭ apatie. Kaj la muzika parto de la prelego estis eĉ pli granda sukceso. Unue mi informis, ke nun finna esperantobando Dolchamar rokas kanton nomiĝante “Ĉu vi pretas?” Iu demandis ”Ĉu ĝi estas esperanta kanto?”, sed ŝia mieno malkaŝis la veran celon de demando: Ĉu oni vere povas roki esperante? Nature jes, kaj kiam aŭdantoj mem aŭdis tion, ili simple ekscitiĝis: multajn plezurajn mienojn oni povis vidi – apatio do malaperis!

Longe mi supozis, ke la esperantorilatoj de ĉi tiu vojaĝo finiĝus kun la sensacia prelego, sed kelkaj tagoj antaŭ mia vojaĝo mi legis en reto, ke ekzistas esperanto-klubo en Tartu kaj post kelkaj retroŝtmesaĝoj kaj telefonaj konversacioj kun diversaj homoj estis renkontiĝo jam konsentite kun tartua esperantisto Kalle. Ĉi tio

Jukka “Juĉjo” Vaijärvi

Mia favorata akva sporto

Ondoj lululas, suno karesas kaj vento susuras vele. Ĉiujn tiujn elementojn ofertas mia favorata akva sporto, velkanotado.

La velkanoto estas principe ordinara kanadotipa malferma kanoto, ekipita per masto kaj velo. Se oni volas taki, kilo necesas. La plej simpla solvo estas uzi du flankkiloj, unu en ambaŭ flanko de la kanoto. Kiam oni takas, la kilo de la ventsirmita flanko estas etendita akven. Pro stiri pli ekzakte la plejmulto de velkanotistoj uzas rudron, sed plej spertaj scipovas stiri ankaŭ senrudre.

Dum multaj jaroj mi rigardis rudron kiel superflua etburĝaĵo sed lastatempe venkinte la velkanotan konkurson sur la lago Tuusulanjärvi, mi ekŝatis ĝin kaj la facilecon manovri en malvastaj akvejoj.

Fakte la velkanoto estas neniu nova inventaĵo, Polinezianoj esploris kaj loĝigis la tutan Pacifikon per ĝi kaj eŭropanoj komencis sportumi kaj ekskursi per velkanotoj ekde 1860-aj jaroj.

La malferma velkanoto estas tre utila ekskursboato, oni povas veli senstrece dekoj da kilometroj tage kaj atingi preskaŭ ĉiun insulon kun bivakiloj.

Pli da informoj troviĝas finne ĉe www.kanoottiliitto.fi aŭ angle se oni serĉas per vortoj “sailing canoe”.

ne estis mia unua fojo, kiam mi konatiĝis kun eksterlanda esperantisto, sed por mi ĝi estas la plej grava, ĉar ĝi estas tute mem-organizita kaj ideita. Alia afero, kiun mi tre multe ŝatas, estas, ke nun mia vojaĝo ofertis pli multe ol sen esperantokontaktoj. Nun mi ekzemple vidis lokojn, kiujn mi sola ne komprenus eĉ serĉi.

Finfine mi povas esti kontenta kun pasinta printempo: mi faris entute tri vojaĝojn kaj du el ili rilatis iel kun esperanto kaj la tria vojaĝo estis alimaniere sukcesa. Kion pli mi povus deziri?

Paula Niinikorpi

Muut lehdet

Lehtikatsauksessa on juttuja kolmesta teemasta: Dolchamarin menestyksestä rokkimaailmassa – eikä vain esperantorokkimaailmassa; esperanton opettaja Atilio Orellana Rojasin vierailusta Turussa ja Raumalla, kun hän matkusti Valamon kansanopistoon opettamaan esperantoa kesäkurssilla; lisäksi esperantoa käsiteltiin tai mainittiin kielenä muutamassa yksittäisessä lehtijutussa.

Dolchamar oli Kansan Uutisissa ja Itäväylässä – Porvoon ja Loviisan lisäksi 9:ssä niiden ympäryskunnassa ilmestyvässä lehdessä – mukana miltei sivun kokoisissa jutuissa.

Itäväylässä 22.7. esitellään bändin musiikki-tyyliä, esiintymisiä pääasiassa muualla maailmassa esperanto-tapahtumissa, bändin syntyä porvoolaisten kaverusten kesken ja muuttumista esperanto-bändiksi. Lehdessä haastateltu Patrik Austin sanoi, että Dolchamar oli ensimmäinen nuoria kiinnostava melodista diskorokkia soittava kokoonpano esperanto-musiikin genressä. Se oli uutta ja toi siksi suosion. Lopuksi jutussa mainitaan bändin toisen albumin valmistumisesta, Melu- ja Faces-festivaalien keikoista Suomessa sekä luvataan Itäväylän porvoolaisille lukijoille, että syksyllä Dolchamar soittaa keikan Porvoossa.

Kansan Uutisissa 13.5. Dolchamar esitellään vielä Suomessa tuntemattomana mutta kohti julkisuutta matkaavana bändinä. Lehti esitteli bändin synnyn Porvoossa sekä tunnettuuden maailmalla eikä niinkään Suomessa. Kansan Uutisiin haastateltu Patrik Austin kertoi oman esperanto-kiinnostuksensa synnystä ja esperantonuorten toiminnasta. Patrik kertoi sanoittavansa biisit suoraan esperantoksi ja että bändi saa fanipostia mm. Japanista, Venäjältä ja Brasiliasta.

Sekä Itäväylässä että Kansan Uutisissa oli Dolchamarin reipas ryhmäkuva reippaan kokoisena.

Dolchamar on ollut esillä lisäksi Helsingin Sanomien (19.6.) ja Turun Sanomien (8.7.) kulttuuritapahtumien esittelyissä, kun bändi esiintyi Faces-etnofestivaaleilla heinä-elokuun vaihteessa, YleX:ssä (30.6.), Itä-Uudenmaan suomen- ja ruotsinkielisissä lähetyksissä, Uusimaa-lehdessä, Hufvudstadsbladetissa, Etelä-Suomen Sanomissa ja YLEn teksti-tv:ssä.

Atilio Orellana Rojasta haastateltiin Turun Sanomissa (20.7.) ja Åbo Underrättelserissä (2.7.), kun hän kävi Turussa esittelemässä esperanton kieltä. Käynti liittyi Atilion matkaan Valamon esperanto-kurssille.

TS:ssa Atilio kertoi esperanton opettajan työstään, kun hän on kiertänyt yli 60 maassa, siitä, miten hän oppi kielen opiskelemalla sitä itseseen. Hän sanoi, että esperanto ei ole vain kieli vaan myös kulttuuri.

ÅU:ssa mainittiin Atilion esittelevän esperantoa Turussa ja jatkavan Valamon kansanopistoon, jossa hän toimi esperanton opettajana. Atiliosta esitellään hänen taustansa ja kielitaitonsa, hän hallitsee yhdeksää kieltä.

Raumalaisessa Länsi-Suomessa (4.7.) esiteltiin samoin Atilion vierailua Raumalla. Hän esitteli esperantoa sekä kielenä että inhimillisiä arvoja korostavana ideologiana. Esperantistit ovat moniarvoisuutta kunnioittavia, sanoi Atilio. Hän vieraili Vanhassa Raumassa ja vertasi alueen värejä Karibian värimaailmaan.

Länsi-Suomalaisessa oli lisäksi juttu Jukka Pietiläisen valitsemisesta Esperanton maailmanliiton komiteaan sekä selvitettiin sen toimintaa ja kokoonpanoa. Anna Ritämäki mainittiin komitean toisena suomalaisena edustajana.

Kemissä ilmestyvässä Pohjolan Sanomissa (9.5.) oli sivun juttu Enontekiön lukion esperantoryhmän matkasta Strasbourgiin Euroscola-ohjelmaan kuuluen. Mukana oli osallistujia seit-

Minun Esperanto-maailmastani

Iea Iu – Joku Jossain, kylähullu

Nykyään on sanan ”kylähullu” merkitys käännetty ylösalaisin. Kylähulluksi kutsutaankin ihmistä, joka on tehnyt sellaista, mitä muut eivät ole älynneet tai viitsineet, usein jotakin arvokastakin tai vähemmän arvokasta, esimerkiksi istuneet muurahaispesässä, mikä sinänsä on pohjanoteeraus.

Esperanto-maailmassa olen tavannut eri maisia ja kulttuureista mitä erilaisimpia ihmisiä, vaikka ei nyt kukaan olekaan muurahaispesässä istunut. Jotkut jäävät paremmin mieleen kuin toiset, sanoisin heitä eräänlaisiksi kylähulluiksi, positiivisessa mielessä. Yksi sellainen oli yli 80-vuotias Dic Captein. Elokuussa 1994 hollantilainen ryhmä osallistui Kolmas ikä -tapahtumaan Jyväskylän yliopistossa. He yöpyivät Viitakivi-opistolla Hauholla. Jo ennen tapahtumaa hän oli kirjoittanut toivoen tapaamista. Niinpä Pennasen Martti hakikin hänet autollaan Lahteen. Järjestimme oikein kerhoillan vieraamme kunniaksi. Vaikka oli kesäaika, tuli kaksitoista innokasta kerholaista kuuntelemaan mitä kerrottavaa veteraanilla on.

Mies osoittautui mielenkiintoiseksi veikoksi. Ikään kuin alkulämmittelyksi hän kertoili mm. nuoruusaikojensa seikkailuja. Oli kaverinsa kanssa rakentanut kevyen kulkuneuvon, jossa oli polkupyörän pyörät. Edessä oli jonkinlaiset vetoaisat ja takana työntökahvat. Sisällä kaksi nukkumapaikkaa. Kylkeen oli maalattu iskulauseita esperantosta. Tällä kaikkien asuntovaunun äidillä pojat olivat reissanneet ainakin Ranskassa ja Espanjassa nukkuen yöt pömpelissään. Päivät tehtiin taivalta, toinen veti ja toinen työnsi. Välillä vuorotellen toinen veti ja toinen oli pötköllään sisällä. Niin matka oli taittunut maasta toiseen.

Sitten hän siirtyi varsinaiseen teemaan. Aluksi vieraamme ilmoitti esperantomailmassa käyttävänsä nimeä Iea Iu, eli Joku Jossain. Tunsin oitis sympatiaa tätä harhailijaa kohtaan. Ehkä siksi että usein itsekin tunnen olevani joku jossain.

No niin. Hän ilmoitti, että oli luonut uuden aikajärjestyksen maailmaan. Ei sen enempää eikä vähempää. Ajatus pohjautui havaintoon, että ihmisille nykyiset minuuttiaikataulut olivat

semästä Euroopan maasta. Jutussa haastateltiin Jenni Keskitaloa, Minna-Maarit Korvaa ja Matleena Vieltojärveä esperanton käytöstä ja puhumisesta. He esittivät arvioita esperanton käytöstä kansainvälisessä yhteistyössä, siitä, mihin kieli heistä sopisi. Toisessa sivun jutussa kerrottiin Euroscola-hankkeen taustasta ja enontekiöläisten matkan ohjelmasta ja reitistä. Lyhyt johdatus esperantoon -jutussa esiteltiin sen kielioppi ja rakenne pähkinänkuoressa. Tosin oppi ei ollut mennyt toimittajalle aivan oikein perille. Jutussa oli käännettynä ”Kien vi Iras? Hejmen”. ”Missä olet? Kotona.”

Sana-lehdessä (27.5.) haastateltiin Anja Karki-aista hänen kristillisestä elämänsomuksesta ja esperanton harrastuksesta. Anja tutustui Oriveden opiston esperanto-kurssilla norjalaiseen, joka oli kääntänyt runoja esperantoksi. Ne kuultuaan hän kirjoitti muutaman esperantorunon ja lähetti ne tuolle norjalaiselle, joka vuorostaan kommentoi Anjan tekstejä. Sen jälkeen hän on kirjoittanut runoja esperantoksi sekä suomeksi. Hän kertoi myös esperantistien hartaushetkistä useissa esperanto-tapahtumissa, kuten Esperanton maailmanliiton kongressissa.

Jukka Noponen

liian stressaavia. Jopa sekuntien, jopa sadasosien tarkkuudella mitattiin ihmisen elämää. Niinpä hän oli syvästi asiaa tutkittuaan laatinut kvartti-järjestelmän, jossa lyhin aikaväli oli 15 minuuttia!

Iea Iu piirteli tarmokkaasti luentopaperille viivoja ja kaavioita, joilla hän todisti, ettei järjestelmä ollut tuulesta temmattu, vaan se oli sovelias planeettojen välisiin liikkeisiin. Aina välillä hän kurkki kuulijakuntaansa tuuheiden kulmakarvojensa alta aivan kuin haluten tietää, menikö perille. Ei oikein mennyt. Meitä istui kaksitoista kerholaista lievästi sanoen ällikällä lyötynä. Kurkimme välillä toisiimme. Oliko se tosissaan? Vakavalta se kyllä näytti, ei hymyn häivää. Kun tilaisuus tuli, tiedustelin oliko Joku Jossain esitellyt ideaansa suurelle yleisölle laajemmaltikin, ja mies kertoi kirjoitelleensa kvartti-järjestelmästä utterasti hollantilaisiin lehtiin. No miten oli reagoitu? Siihen ei luennoitsijamme voinut antaa tarkkaa selvitystä, koska lehtien toimitukset olivat suhtautuneet erittäin nihkeästi uuteen aikajärjestelmään. Eli juttuja ei ollut julkaistu.

Kun saatoimme mestaria linja-autoasemalle, hän kaivoi taskustaan urheilukilpailussa käytetävän sekundaattorin ja tiiraili sitä. En malttanut olla huomauttamatta, että mitenkäs tuo nyt käy yksiin kvartti-järjestelmän kanssa? Hän selvitti, kunnes kvartti-järjestelmä tulee voimaan ja esimerkiksi linja-autotkin lähtevät sen mukaan, on käytettävä näitä olemassa olevia ajanmittaajia. Hyvin perusteltu!

Kun kotona mietin kvartti-järjestelmää, tulin siihen tulokseen, että tämä Joku Jossain oli melkoinen velmu. Tai sitten se oli uskonut vahvasti siihen mistä puhui. Toisaalta muistan lukeneeni, että joskus sisävesillä höyrylaivaliikenne oli hyvin tärkeä aikana, jolloin ei ollut autoja eikä juuri teitäkään. Silloin laivat lähtivät aamupäivin, keskipäivin tai iltapäivin, kun kaikki tavarat ja lehmät ja lampaat oli lastattu. Siis oli voimassa noin-aikataulut. Itse asiassa aikataulu oli vieläkin väljempi kuin kvartti-aikataulu. Luu-

len että ihmiset olivat onnellisia. Ehkäpä nykyiseen sekuntiaikatauluun mentiin kvartti-aikataulun kautta joskus aikanaan. Jospa Joku Jossain olikin myöhäsyntyinen keksijä!

Viisi vuotta vankkureissa ympäri Eurooppaa

Joskus muutamia vuosia sitten ainakin muutamissa esperantolehdistä oli ilmoitus, että ranskalaiset esperantonuoret suunnittelivat matkaa ympäri Eurooppaa. Muistaakseni nuoret toivoivat yhteydenottoja myös pohjoismaisilta esperantisteilta. Siitä, että matka todella toteutui, luin vuoden 2003 alkupuolella Pariisissa ilmestyvää SAT-Amikaro -lehdestä. Ehkä nyt joku tuhahtelee, mitäpä siinä on kertomista, sillä nyky maailmassa nuoriso matkustelee tämän tästä hyvien liikenneyhteyksien avulla ympäri maailmaa. Niinpä, mutta nuoret seikkailijat Gudule Le Pichon ja Laurent Cuenot matkasivat hevosen vetämässä katetussa kärryssä, vähän samanlaisessa vankkurissa kuin ennen vanhaan villissä lännessä uudisasukkaat matkasivat. Kuitenkin kumipyörin varustetussa.

Matka alkoi 5. toukokuuta 1997 Le Poirouxista ja päättyi lokakuussa 2002. Viiden ja puolen vuoden aikana saman tamman vetämä kärry köpötteli ympäri Eurooppaa, pohjoisin maa oli Ruotsi, eteläisin Espanja. Pariskunnalla oli lähtiessä 6-kuukautinen tyttö Lola ja palatessa tällä lisäksi pikkuveli Romain. Kauralla ja heinällä kulkeva karavaani vieraili aina kun mahdollista eri maiden esperantistien luona, jotka auttoivatkin heitä monin tavoin. Kun seikkailijat palasivat pitkältä matkalta, La Roche-sur-Yon -nimisen kaupungin esperantistit järjestivät juhlan vastaanoton. Sanomalehdet haastattelivat ja TV raportoi. Vähemmästäkin on kirjoja kirjoitettu.

Miksen sitten minä?

Vanhakin oikein innostuu tällaisista seikkailuista. Harmittaa kun ei nuorena tullut keksittyä jottain yhtä mielenkiintoista. Jos olisin nuori, os-

taisin aasin, jolla matkailisin ympäri Eurooppaa, ainakin ympäri Suomea. No, melkoisen varmas-ti ostaisin. Sen aasin nimi olisi tietysti Esperanto, ja se olisi maalattu suurin vihrein kirjaimin elukan kylkeen. Aurinko paistaisi. Soittaisin huuliharppua silloin tällöin. Levittäisin huovan niityn laitaan ja nukkuisin yöt, heräisin lintujen lauluun. Vierailisin esperantokerhoissa. Olisin mielelläni kylähullu. Tai korttelihullu tai mikä hullu tahansa, kunhan saisin vaellella vapaana.

Noh, voisin tietysti vieläkin... mutta kun en siedä maata kylmässä muhkuraisessa maassa enkä pidä sateessa märkänä tallustamisesta ja mistä sen aasinkin nyt enää hankkisi ja mitä poliisitkin ja eläinsuojeluhmiset sanoisivat...?

Ehkä pitää todeta, että se aika on jo jäänyt taakse, jolloin toteutettiin haaveita.

Esa Lång

Satunmaa: Liettua

Syksyllä 1998 vierailin Liettuassa ja tutustuin mm. sen 98 km pituiseen hiekkarannikkoon. Nyt, kun varmaankin me suomalaiset suunnitteleimme vuoden päästä matkustavamme jonkinmoisena joukkona Liettuaan, ehdotan, että vauraudumme Kansainvälisessä illassa laulamaan/laulattamaan koko yleisöllä tervehdyksenä Liettualle Unto Monosen laulun Satunmaa, onhan Liettua Suomesta nähden jossakin aavan meren tuolla puolen hiekkarantoinen. Esperantosanat: ”Kune ni kantas”, pianosäestys Toivelauluja 2, s. 202. Siispä kaikissa tilaisuuksissa harjoitellaamme pianon/hanurin säestyksin! Tai muuten vaan!

Ehdotti pema_z

Lingvouzo en kantokonkurso

En Esperanta Finnlando 3/2004 Mikko Mäkitalo skribis interesan artikolon pri muziko kaj esperanto, Musiikki on todellista esperantoa. Ege surprizis min lia mencio pri nova regulo en la Eŭropa kantokonkurso de 1977 laŭ kiu oni devas kanti en oficiala lingvo de la lando. Mi ja kredis ke oni ĉiam ĝis 1998 devis kanti en sia propra lingvo.

Tio instigis min studi la aferon. En interreto mi trovis ke ekzistis regulo pri la lingvo de la lando inter 1966 kaj 1972 kaj la regulo pri libera uzo de lingvoj validis dum kvar jaroj 1973-76. Dum tiuj jaroj gajnis Luksemburgio per franca kanto, Svedio per Waterloo (en la finalo kantita angle), Nederlando per angla kanto kaj Anglio per angla kanto. En tiu tempo eĉ Finnlando kantis angle kaj Mikko certe pravus kiam li konstatas ke oni de 1977 volis limigi la kreskantan uzon de la angla. Unu ideo de la Eŭropa kantokonkurso ja estas – almenaŭ estis – ke oni spertu la lingvan bunton de Eŭropo.

Dum la jaroj 1977-98 Irlando venkis ses fojojn kaj Anglio du, entute ok anglaj kantoj dum 22 jaroj. Ke ne temas nur pri la angla lingvo montras ke kvar fojojn venkis franclingva kanto, Israelo venkis tri fojojn kaj Svedio du same kiel Norvegio. Aliaj venkintoj kantis en la germana, itala kaj serbokroata. Evidente lingvo ludas rolon tiel ke homoj prefere donas poentojn al kanto kies vortojn oni komprenas. Se la gajno por la lando gravas estas en ordo ke oni rajtas kanti en iu ajn lingvo. Sed se pli ol duono de la kantoj estas en sama lingvo tio ne estas bone, eĉ se tiu sama lingvo estus esperanto. Tamen mi kiel Mikko atendas la tempon kiam ni la unuan fojon aŭdos esperantan kanton en la konkurso. Kiam ĉiuj kantas esperante certe estas tempo por fari novajn regulojn.

Carola Antskog

Kiel uzi la vortojn si kaj sia?

La vortoj ‘si/sin’ kaj ‘sia(j)/sia(j)n’ estas pronomoj, kies uzo foje postulas atenton. Ili estas uzataj nur por la tria persono kaj reprezentas la subjekton de la laste esprimita ago. Kion tio signifas? Ni rigardu kelkajn ekzemplojn.

(1) *Li amas sin mem.* ‘Li’ estas tria-persona subjekto de la verbo ‘amas’, kiu esprimas la solan agon en la frazo. La objekto ‘sin’ reprezentas la saman personon kiel la subjekto.

(2) *La knabino petis, ke la knabo gardu sin.* ‘Sin’ estas objekto de ‘gardu’ kaj reprezentas la subjekton ‘knabo’.

Ni povas ankaŭ diri samsence, uzante infinitivon:

(3) *La knabino petis la knabon gardi sin.* Ĉi tie ni havas unu frazon. La lasta esprimita ago estas ‘gardi’ (infinitivo) kaj ĝia senca subjekto estas la knabo, kiu ĉi tie staras en akuzativo pro la verbo ‘petas’. La objekto ‘sin’ reprezentas la sencan subjekton ‘knabo’.

Sed se ni volas diri, ke la peto de la knabino celas, ke la knabo gardu ŝin, t.e. la knabinon, ni devas uzi ‘ŝin’:

(4) *La knabino petis, ke la knabo gardu ŝin.*

(5) *La knabino petis la knabon gardi ŝin.*

‘Ŝin’ en (4) kaj (5) diras al ni, ke estas la knabo, kiu devas gardi la knabinon.

Sama regulo validas pri ‘sia’:

(6) *La lernanto studis sian libron.* La objekto ‘sian’ reprezentas la subjekton ‘lernanto’.

(7) *La instruisto petis, ke la lernanto studu sian libron.* ‘Sian’ diras al ni, ke temas pri la libro de la lernanto.

Ni povas ankaŭ diri samsence, uzante infinitivon:

(8) *La instruisto petis la lernanton studi sian libron.* ‘Lernanton’ estas

objekto de la verbo ‘petis’ sed samtempe la senca subjekto de ‘studu’, la laste esprimita ago en la frazo. Sed se ni volas diri, ke la peto de instruisto celas, ke la lernanto studu libron de la instruisto, ni devas uzi ‘lian’:

(9) *La instruisto petis, ke la lernanto studu lian libron* (t.e. de la instruisto).

Ni povas ankaŭ diri samsence, uzante infinitivon:

(10) *La instruisto petis la lernanton studi lian libron.*

Fine, jen du ŝlosilaj frazoj:

(11) *La sinjoro ordonis la serviston vesti sin* (t.e. ke la servisto vestu sin mem).

(12) *La sinjoro ordonis la serviston vesti lin* (t.e. ke la servisto vestu la sinjoron).

Baldur Ragnarsson, Islando

objekto: vorto, kiun celas la ago; subjekto: vorto, pri kiu oni asertas, konstatas ion.



Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ Taneli Huuskonen, huuskone@cc.helsinki.fi www.esperanto.fi/helsinki
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohjantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ martti.pennanen@phnet.fi
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ✉ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2004 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2004**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Ilmoitukset joko sähköpostitse: eaflehti@esperanto.fi tai suoraan liiton toimistoon: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki



En sekva numero, legu pri okazaĵoj en Rusio:

Kio ŝteliĝis?

Kio rompiĝis?

Kio lerniĝis?

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuussa. Jutut 15.9.2004 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2004 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflenti@esperanto.fi>.

Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2004